

Konga Stelo

*Trimonata informilo de DKEJO (Demokratia Kongolanda Esperantista Junulara Organizaĵo)
kunlabore kun aliaj kongolandaj Organizaĵoj.*



Enhavo

Front-paĝe : DR Kongo en Afriko (bildo)

Redakcie1

Muholeza Esperanto Klubo Kolwezi2

Amuzaĵo : Pri lingvoj.....3

Mirindaj retpaĝoj.....4

UEA facila5

Ebola en Goma6

Dua Muzika albumo, Chris Freddy7

Fruktrareco en Rutshuru, poemo8

Tradiciaj trinkaĵoj en Norda kaj Suda Kivuoĵ ..9

Fortuno12

Kiu mi estas ?13

Lecion pri la Sŭahila 15

Dors-paĝe : Kvieta pasinio

Redakcie

Joel Muhire



Karaj legantoj!

Nia revuo *Konga Stelo* du-jariĝas ĉi-julie! La redakcio denove dankas niajn fidelajn kunlaborantojn kies artikoloj nutras regule nian revuon. Estas dankindaj ankaŭ niaj eksterlandaj kunlaborantoj kaj legantoj!

Konga Stelo komence estis 22-paĝa, aŭ ne malpli ol 20 paĝoj, sed ĉi-foje tre malmultas kontribuaĵoj, tial ni opinias redukti la nombron de la paĝoj je pli malpli 15, aŭ tutsimple je malpli ol 20 paĝoj!

Ĉi-numere vi trovos raporton pri MEKK, Muholeza Esperanto Klubo Kolwezi, ekscios pri Mirindaj retpaĝoj, UEA facila, Ebola en Goma, anonco pri la dua muzika albumo de Chris Freddy, tradiciaj trinkaĵoj en Norda kaj Suda Kivuo, konsiloj pri Fortuno, ...

Samideanino Sharifa Abas el Kenjo demandas sin, *Kiu mi estas?* Kaj invitas vin al sia venonta verko!

Kiel kutime, ni denove prezentas al vi etan lecionon pri la Sŭahila lingvo. Bonan legadon kaj ĝis la 10a numero!

Konga Espero (KS) estas trimonata informilo de DKEJO (*Demokratia Kongolanda Esperantista Junulara Organizaĵo*) eldonata kunlabore kun aliaj kongolandaj organizaĵoj.

Redaktoro: Joel Muhire

Kontaktoj: joelmuhire0@gmail.com, Tel. +243 977 643 030

Provleganto : Françoise Noireau, desiredapprendre@gmail.com

La estraro de DKEJO (2025-2028)

Prezidanto : Waziwazi Grâce,

Tel. +243 976 413 837, rete: dkejo@outlook.com.

Vicprezidanto : Ramazani Nanjira, Tel. +243 981 137 264

Sekretario : Jofina Mungosy, Tel. +243 979 051 901

Kasisto : Ornella Idumba, Tel. +243 970 702 532

Konsilanto: Carine Idumba, Tel. +243 893 174 046

Kiel sendi kontribuaĵojn al *Konga Stelo*?

✓ Prefere sendu tekston originale verkitan en Esperanto kun foto/bildo memfarita.

✓ Se vi sendas tradukaĵon, bv. indiki la originajn fontojn, lingvon kaj aŭtoron. Pri fabelo indiku, ĉu ĝi estas popola (kaj de kiu popolo) aŭ verkita de vi.

✓ Fotoj devas esti bonkvalitaj. Ne forgesu aldoni la nomon de la artisto aŭ de la fotinto!

✓ Viaj kontribuoj povas temi pri e-agado en via loĝregiono, poemoj, kulturo (manĝaĵo, vivmaniero, bredado, transporto, ktp), naturo, rakontoj, humuraĵoj, lingvoj, ktp.

✓ Bonvolu sendi vian artikolon rete kiel kutiman retmesaĝon aŭ en formato RTF al:

joelmuhire0@gmail.com plej laste, je la fino de ĉiu tria monato.

Ekpretigu do viajn artikolojn ĝis la 20a de septembro 2026, kaj koran antaŭdankon!

La retejo de Konga Stelo estas :

https://uea.org/vikio/Konga_Stelo_Revuo.



DKEA: Demokratia Kongolanda Esperanto Asocio, fondita en 1963.

DKEJO : Demokratia Kongolanda Junulara Organizo, fondita en 1984.

ILEI: Internacia Ligo de Esperantis-taj Instruistoj. www.ilei.info.

Bonvolu subteni la redaktoran laboron malsendante al la FEL-konto : **oelm-x**.

FEL- Flandra Esperanto-Ligo

Muholeza Esperanto Klubo Kolwezi



Muholeza Mbomba – Kolwezi

Muholeza Esperanto Klubo Kolwezi, MEKK estis kreita de Muholeza Mbomba en 2025 kaj funkcias en la provinco Lualaba, sudoriente de Demokratia Respubliko Kongo). La ĉefaj agadoj de MEKK estas propagandi kaj instrui Esperanton al novaj adeptoj, sed ankaŭ antaŭenigi internacian amikecon kaj kulturen interŝanĝon.

Agadoj de la Klubo

Nia klubo, Muholeza Esperanto Klubo Kolwezi organizas regulajn Esperanto-kursojn por komencantoj kaj progresantoj. La in-

struado okazas kaj ĉeeste kaj rete. Aldone al la lokaj kursoj, nia klubo administras *WhatsApp*-grupon, kie ni instruas Esperanton al lernantoj el diversaj landoj. Tiu grupo faciligas la internacian interŝanĝon de spertoj kaj praktikan uzadon de la lingvo inter esperantistoj de malsamaj kulturoj. La klubo ankaŭ uzas sociajn retojn por prezenti Esperanton al pli vasta publiko kaj instigi novajn personojn eklerni la lingvon.

Membroj

Nuntempe nia klubo havas 15 membrojn. La membroj aktive partoprenas en kursoj, dis-

kutoj kaj aliaj edukaj agadoj. La klubo celas daŭre kreskigi sian membraron en Kolwezi kaj en la tuta provinco Lualaba.

Defioj

La klubo alfrontas jenajn malfacilaĵojn:

- *Manko de lernomaterialoj (libroj, vortaroj kaj prikursaj dokumentoj).*
- *Manko de financaj rimedoj por presado de materialoj.*
- *Malfacilaĵoj rilataj al pago de kunvenejo por regulaj lecionoj kaj renkontiĝoj. Limigitaj rimedoj por reklami Esperanton al pli vasta publiko.*

Estontaj Planoj

La klubo planas:

- *Pliigi la nombron de la membroj*
- *Produkti kaj distribui pliajn lernomaterialojn*
- *Organizi kulturajn kaj edukajn eventojn*
- *Plifortigi la internacian WhatsApp-reton de lernantoj*

- *Serĉi kunlaboron kun Esperanto-organizaĵoj tra la mondo,*
- *Krei novajn retajn kursojn por personoj kiuj ne povas partopreni ĉeestajn lecionojn.*

Konkludo

Malgraŭ la financaj kaj materialaj defioj, Muholeza Esperanto Klubo Kolwezi (MEKK) daŭrigas sian agadon por Esperanto kun granda entuziasmo. Ĝi kontribuas al la disvastigo de Esperanto en Lualaba sed ankaŭ ekster Lualaba per sia reta instruado. Ĝi esperas ricevi plian subtenon por plivastigi siajn agadojn kaj atingi pli da lernantoj.



Muholeza Mbomba, estro de Muholeza Esperanto Klubo Kolwezi, lernis Esperanton en 2021 en Uvira, Suda Kivuo.

Rete: muholezambomba346@gmail.com

Telefono kaj WhatsApp: +243 972 378 360.

Amuzaĵo : Pri lingvoj

En iu ĉina vilaĝo vivis bienulo. Li havis filon, kiun li sendis por studoj al Francujo. Reveninte hejmen, la filo parolis al siaj gepatroj kaj al ĉiuj aliaj nur franclingve. Li ne parolis eĉ unu vorton en sia gepatra lingvo, ĉar li ... forgesis ĝin. Neniu povis kompreni lin, kaj oni konsideris lin kiel fremdulon.

Konato el najbara vilaĝo vizitis la bienulon. Fiere la patro raportis pri sia klera filo: „Mia filo revenis antaŭ du tagoj el Francujo; li perfekte parolas la francan lingvon. Aŭskultu!” En ĉi tiu momento oni efektive povis aŭdi la studenton, kiu troviĝis ekster la domo. Li estis laŭte krianta: Helpu! Helpu!”... franclingve. Ĉar li, malfeliĉe, falis en lageton kaj estis drononta. „Ah, mi aŭdas lin!” diris la vizitanto. „Kion li diras?” „Li nun kantas francan kanton!” respondis la fiero patro.

El la libro *"Miru, Pensu, Ridu"* (datita de 1950), paĝo: 230.


Mirindaj retpaĝoj por mirindaj esperantistoj

Waldemar Napora – Pollando

Mi volas prezenti al la legantoj de Konga Stelo du interesajn kaj vizitindajn retpaĝojn : la kurson Saluton kaj la socian esperantlingvan retejon MiaVivo.

La kurso Saluton

La unua estas Kurso *Saluton* kies retpaĝon (www.kursosaluton.org/) kreis la brazila Esperantisto Ismael Ávila. La retpaĝon mi ekkonis danke al sugesto de



mia Esperanto-amiko el Brazilo, per ĝi li lernis kaj komprenis Esperanton senprobleme. Mi, kiel eterna komencanto kompreneble forgesis pri tio, sed serĉante las-

tatempe en la interreto mi denove trovis tiun retpaĝon, unue mi ne komprenis ke ja tio estas retpaĝo jam sugestita al mi! Mi estis skeptika, ja eĉ kiel eterna komencanto paĝoj de tiu kurso estas tro simplaj por mi, sed fakte la kurson mi rimarkis ke ĝi estas pli progresinta ol mi antaŭe pensis. Ĝi bonas por ne-Esperantistoj kiuj ne havas aliron al rimedoj en ilia propra lingvo. La kurso *Saluton* uzas la rektan metodon, do per bazaj vortoj, grafikoj kaj ripetado enkondukas novajn vortojn al la lernanto. Bona kurso ankaŭ por pli spertaj Esperantistoj, ĉar danke al ĝi oni povas provi sian Esperanton kaj vidi je kiu nivelo oni estas.

Mi volas aldoni ke la kurso baziĝas (fakte ĝi estas enretiĝo de menciota verko) sur la libro *Saluton! Esperanto aŭtodidakte* verkita de Audrey Childs-Mee (1926-1990), lerta kaj sperta Esperantistino kiu per sia sperto kreis tiun bonegan libron. Verdire, se mi ne provus la kurson mi pensas ke mi ne scius pri ŝi kaj precipe pri tiu libro. Do oni povas vidi la retpaĝon ankaŭ kiel omaĝo al ŝi! Laŭ mi, tiu kurso-libro estas unu el la plej bonaj rimedoj por instruado de Esperanto al iu ajn lernantoj. Danke al ĝia simpleco kaj klareco, oni povas malrapide legi sekvajn paĝojn, eksciant la strukturon, vortprovizon kaj karakteron de Esperanto sen iuj gramatikaj lecionoj aŭ multaj nacilingvaj rimedoj. Poste, la individua Esperantisto aŭ instruanto povas aldoni al la instruado simplajn rimedojn kiel legaĵojn aŭ bildojn. Tiel oni Esperantistiĝos sen grandaj penoj.

Mi ankaŭ volas instigi aliajn por kreado kaj uzado de similaj rimedoj, la rekta metodo por lingvoj kiel Esperanto laŭ mi estas perfekta. Ne indas investi tro multe al nacilingvaj progresintaj kursoj kiam jam bazaj nur-Esperantaj kursoj povas multege ekspliki al novuloj. En Esperantujo ni estu inventemaj.

MiaVivo.



Dua retpaĝo, kiun mi nun prezentas al vi estas *MiaVivo* (<https://www.miavivo.net>), kreita en 2020 de sveda Esperantisto, Johannes Genberg. Oni povas vidi la retpaĝon kiel Esperantistan fejsbukon. Tute Esperantista amaskomunikilo, kiu estas senpaga kaj simpla por uzado, do propra anguleto por ĉiu Esperantisto. Per Esperanto oni povas

libere skribi pri io ajn tie, kaj per Esperanto oni povas trovi novajn retajn amikojn el la tuta Esperantujo. Do granda uzantbazo gravas, tial novaj uzantoj ĉiam bonas. Se iu volus havi iun retan Esperantujon mi rekomendas *MiaVivo*-n.

Kreu grupojn, profilojn, publikigu bildojn kaj afiŝojn, tute en Esperanto por aliaj Esperantistoj, kaj liberiĝu de ne-Esperantistaj (ofte anglalingvaj) amaskomunikiloj. Mi pensas ke Zamenhof uzus *MiaVivo*-n. Do ne atendu, nur registriĝu kaj famiĝu sur la verdaj retpaĝoj de *MiaVivo* per skribado pri *Sia Vivo*!



Ahmad Mamduhi – Irano

La redakcio ĝojas kunpartigi kun vi interesan novaĵon el la letero de Ahmad Mamduhi, la prezidanto de ILEI (<https://www.ilei.info/>), aperintan en la retejo UEA FACILA.

Ahmad Mamduhi: Ĉu vi ŝatus scii pli pri la laboro de ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj) kaj nia venonta kongreso en Ĉinio? Mi ĝojas anonci la publikigon de nova artikolo en la retejo UEA facila. Ĝi donas klaran superrigardon pri tio, kion ni faras: de niaj revuoj (IPR kaj JUNA AMIKO) ĝis niaj retaj kursoj kaj la grava kongreso en Zaozhuang en julio 2026. Bonvolu legi kaj aŭskulti la artikolon ĉi tie:

<https://uea.facila.org/artikoloj/movado/ilei-instruistoj-edukado-kaj-esperanto-r525/>

Pri la artikolo:

- **Verkintoj:** Alessandra Madella kaj Ahmad Mamduhi
- **Voĉleginto:** Maurizio 'Rico' Giacometto

Pri la retejo UEA Facila: La retejon <https://uea.facila.org/> prizorgas Anna Lowenstein kune kun siaj kunlaborantoj. La artikoloj tie estas mallongaj kaj skribitaj per simpla lingvaĵo, perfekte taŭga por lernantoj kaj por tiuj, kiuj volas legi agrable kaj facile. Vi povas malkovri pli da iloj por lernado ĉi tie: <https://uea.facila.org/vortlisto/>.

Ebola en Goma



Joel Muhire – Goma

Ĉiuj Goma-anoj konsterniĝis kiam estis disinformita pri denova frapo, ekaĵero de Ebola en Goma, la ĉefurbo de la provinco Norda Kivuo, kies loĝantaro travivas malfacilegajn vivkondiĉojn pro la antaŭ-du-jara invado; nefunkciado de la bankoj kaj de la internacia flughaveno de tiu urbo.

La 17-an de majo 2026, saninstancoj konfirmis la detekton pri la unua kazo de Ebolo en Goma, urbo kiu situas kelkcentojn da kilometroj for de Ituri, la epi-centro de la epidemio Ebolo. La politika-militista movado AFC/M23 ankaŭ konfirmis pri tiu epidemio kaj rekomendis ke la loĝantoj restu trankvilaj, strikte sekvu la sanajn gvidliniojn kaj plene kunlaboru kun la saninstancoj. La interlandaj transirejoj (loke

nomataj Grande Barrière kaj Petite Barrière) estis tuj fermitaj. Ĉi tiu abrupta interrompo de trafiko grave efikas sur translima komerco kaj suferigas milojn da homoj, kiuj ĉiutage piediras inter la du urboj Goma (DR Kongo) kaj Gisenyi (Rŭando) por perlabori panon. Por eviti infektiĝi, la saninstancoj instigis la loĝantaron strikte observi higienajn kaj preventajn mezurojn:

- Regula manlavado per sapo kaj akvo aŭ man-desinfektaĵo;
 - Strikte eviti ĉian fizikan kontakton kun malsanuloj aŭ la korpoj de mortintoj;
 - Uzi buŝmaskon
 - Tuj raporti ĉiun, kiu montras suspektindajn simptomojn, precipe altan febron akompanatan de sangado aŭ severa diareo.
- Tamen la vivo en Goma fluas kiel normale ekde tiu anonco, kaj ĉies preĝo estas ke tiu virusaĉo finiĝu tuj !



Chris Freddy

anoncas pri sia dua muzika albumo



En la numero 7a de Konga Stelo, ĉe la paĝo 16a, Chris Freddy, juna talenta esperantista muzikisto el Goma (provinco Nord-Kivuo, DR Kongo) prezentis sian unuan seskantan albumon *La amo protektas nin* kaj samartikole anoncis pri sia dua albumo, *Rekta Vojo* kiu enhavas entute 8 kantojn. Chris Freddy celas per sia muziko “diskonigi la lingvon Esperanto, transdoni mesaĝojn de paco kaj disvastigi melankoliajn melodiojn tra la tuta mondo”. La muzika projekto de Chris Freddy estas subtenata de Esperanto-France kunlabore kun Vinilkosmo. Li petas niajn legantojn pri subteno!

La retadreso de C. Freddy : chrisfreddy52@gmail.com.
Vacapo (WhatsApp) : +243995482662

La red.



Frukt-rareco en Rutshuru

Ir Fabrice Birima kaj Joel Muhire

En la fino de la 20-a jarcento, fruktoj estis abundaj en Rutshuru, sendube ankaŭ en aliaj regionoj de nia lando. En vilaĝoj fruktoj, ekzemple papajo, mango, avokado, banano, ... kostis neniom ĉar ili estis haveblaj preskaŭ senpage kaj ĉie ajn. Ĉiu familio havis almenaŭ unu aŭ pli ol unu kampojn kiuj enhavis fruktarojn. Maljunuloj parolas ĉiam pri *bela epoko*, kiam abundis ne nur fruktoj sed ankaŭ ĉiaspecaj nutraĵoj, plie estis kviete tiam, ne kiel nuntempe! Junuloj naskiĝintaj post la jaroj 2000-aj aŭdas pri tio kvazaŭ estas rakontata al ili ia fabelo! Bedaŭrinde la tempo pasas rapide kaj aferoj pli kaj pli ŝanĝiĝas. Nuntempe la diversaj fruktoj estas malabundaj kaj eĉ raraj, kio igas fruktojn ĝenerale multkostaj.

Fruktoj estas bonaj por la homa sano kaj manko de tiuj povas kaŭzi la mankon de vitaminoj kaj mineraloj. Fruktoj provizas precipe Vitaminon C kiu plifortigas imunecon kaj Vitaminon A, gravan por vido kaj kreskado.

Malfortiĝo de la imunsistemo : Kiam oni manĝas malpli da fruktoj, la korpo estas malpli "protektata" kontraŭ infektiĝoj.

Digestaj problemoj kaj mallakso : Multaj fruktoj enhavas fibron sen kiu iu povas havi mallakson kaj pli malfacilan digeston.

Pli alta risko de subnutrado ĉe infanoj : Ĉe la infanoj, manko de fruktoj (kaj ofte aliaj diversaj manĝaĵoj) povas konduki al malfruo de kreskado, perdo de la pezo kaj malsaniĝemo.

Malpli dieta diverseco : Eĉ se ni manĝas aliajn manĝaĵojn, sen fruktoj la dieto fariĝas malpli varia kaj la disvolviĝo de la korpo okazas mizere. Por ŝanĝi la situacion, plantado de diversaj fruktarbidoj nepraj.

Poemo: *Rutshuru kaj la beleco de ĝia rivero*

Rutshuru

*Verdaĵo kovras viajn montetojn
Virunga spiras apud viaj vojoj
Vulkana tero, varma ĉiel ĉoro
Ĉiu ŝtono kantas pri viaj prauloj.*

*Pluvas la beno sur bananojn maturajn,
riveroj rakontas legendojn malnovajn
Infanoj ridas sur polvaj stratoj,
kaj la suno kisas viajn domojn.*

*Rutshuru, mia tero, mia radikoj,
ĉu foren mi iras, ĉu restas mi hejme —
via polvo restas sur miaj piedoj,
via nomo dormas en mia kanto.*

*Mi amas vian venton, vian malfacilon,
vian forton ĉiam la ĉielo nubigas.
Ĉar teritorio ne estas nur mapo,
ĝi estas patrino kiu neniam forlasas.*

Rivero Rutshuru

*Vi fluas, Rutshuru, ĉiel arĝenta fadeno,
tra verdaj valoj kaj montetoj de mia tero.
Matene vi brilas sub ora sunradio,
vespere vi kantas al la luno kun milda sono.*

*Viaj akvoj estas spegulo por la ĉielo,
en vi dancas nuboj, palmoj kaj espero.
Virinoj lavas, infanoj ridas ĉe la bordo,
kaj fiŝoj skribas signojn sur via brusto klara.*

*Vi nutras la kampojn, vi trinkigas la vivon,
sen bruo, sen fiero — nur konstanta dono.
Ĉiam soifo venas, vi estas patrino mano,
ĉiam varmo premas, vi donas freŝan ombon.*

*Ho rivero mia, vi estas pli ol akvo,
vi estas memoro, vojo kaj kanto de la prauloj.
Beleco ne estas nur en via kristala fluo,
sed en la vivo kiun vi kreas ĉirkaŭ vi ĉiujn tagojn.*

*Ndagijimana Justin, el Kiwanja (Rutshuru).
Rete: jndagijimana19@gmail.com.*

Kasiksi, Lutuku, Musururu, Mandale: tradiciaj trinkaĵoj en Norda kaj Suda Kivuoj

Joel Muhire – Goma

Estas sendube ke la akvo estas la plej bona kaj nemalhavebla el ĉiuj trinkaĵoj. Tamen en Norda kaj Suda Kivuoj, en la oriento de DR Kongo estas tradiciaj trinkaĵoj foje nomataj "pombe", tre popularaj kaj ŝatataj ĉefe de alkoholuloj. Jen kelkaj ili.

1. Kasiksi

Kasiksi estas emblema tradicia biero de la du Kivuoj.

Ĝi estas iomete dolĉa kaj acida artmetia biero produktita el dispremitaj flavmaturaj bananoj, miksitaj kun akvo kaj kun aldonita faruno de sorĝo, kiu agas



kiel fermentilo dum almenaŭ tri tagoj en ligna kuvo. Tiu ĉi trinkaĵo kaŭzas ebriecon kiam konsumata troe. Ĝi estas tre populara en kamparaj regionoj de ambaŭ provincoj.

Kultura kaj socia rolo

Kasiksi estas je la centro de la kutimaj ceremonioj de la popoloj (ekz. de la tribo Shi en Suda Kivuo). Ĝi estas nemalhavebla ĉe familiaj kaj tradiciaj eventoj, precipe por dotoj kaj geedziĝaj ceremonioj. Konsiderata kiel loka ĉampano, ĝi enkarnigas fortan simbolon de kunviveco, frateco kaj kultura heredaĵo.

2. Lutuku

Lutuku (aŭ rutuku, kabrama, kindingi) estas loke produktata kaj estas tre populara en Norda Kivuo. Ĝi estas tre ebriiga akvosimila trinkaĵo akirita per fermentado kaj distilado de miksaĵo de maizaj grenoj kaj manioko (tuberoj). Ĝi brulas kiel fajro en la gorgo kaj ebriigas.



Multaj kristanoj konfesioj admonas siajn fidelulojn eviti drinkadon de ĉia ebriigaĵoj: Lutuku, Kasiksi, Vinoj, forta Musururu kaj Mandale.

Sociekonomia aspekto : Kelkaj ŝlosilaj detaloj pri ĉi tiu trinkaĵo

Lutuku estas produktata per tradiciaj metodoj, el fermentitaj pastoj de maizo, manioko kaj sorgoj. Tre malmultekosta kaj populara en la regiono (precipe en Rutshuru kaj Goma), ĝi ĝenerale vendiĝas en malgrandaj likvaĵujoj aŭ reciklitaj boteloj. Lutuku ludas gravan kulturen rolon sed kiel trinkaĵo kun noca rezulto al la publika sano kaj la riskoj de veneniĝo ligitaj al falsitaj produktoj, ĝia produkado kaj vendado ofte estas konsiderataj kontraŭleĝaj, kaj tial malpermesataj.

3. Musururu

Alia emblema tradicia loka manĝaĵo-trinkaĵo de ĉi tiu parto de orienta Kongo DR estas Musururu (konata kiel Musululu en Suda Kivuo). Musururu estas loka tradicia biero akirita per la spontanea fermentado de ĝermita sorgopureo (kaj granda kvanto da akvo). Ĝi havas karakterizan ruĝec-brunan koloron. Ĉi tiu manfarita trinkaĵo estas integrita parto de la kultura identeco de la regiono. Do, Musururu, simbolo de konservita tradicio, daŭre ravas orientkongo-landanojn, ofertante unikan kaj nutraĵ-riĉan gustosperton.



Sorgofaruno

La Produktada Procezo: Arto Transdonita Tra Generacioj



La produktado de Musururu, tute ne estas simpla, temas pri vera arto majstrita de dediĉitaj metiistoj. Por pretigi la bieron Musururu, necesas aĉeti ruĝajn sorgograjnojn kaj konservi ilin dum kvar tagoj. Poste, sekigi ilin en la suno antaŭ ol porti ilin por esti muelitaj. Sekvas miksado de la faruno kun bolanta akvo, la miksaĵon oni lasas fermenti dum almenaŭ tri tagoj. Tiu forta speco de Musururu ebriigas.

Kristanoj produktas leĝeran specon de Musururu el maiza kaĉo sur kiu estas aldonata sorgofaruno, poste la miksaĵon oni lasas fermenti dum almenaŭ unu aŭ du tagoj.

En Goma la vendistoj de leĝera speco de Musururu (foje nomata kristana trinkaĵo, ĉar ĝi neniel povas ebriigi) aldonas mielon aŭ sukeron al ĝi por konservi ĝian kvaliton por pliaj tagoj.



Amata kaj alirebla bongustaĵo

Multaj vendistoj de Musururu transformis siajn hejmojn en bonvenigajn rifuĝejojn por musururu-entuziasmoj kaj ĉi tiuj sukcesas vivteni siajn familiojn el tio. La plej ŝatata de la homoj kvalito de Musururu estas la forta kaj ebriiga. La regiono Granda Kivuo (norda parto de Norda Kivuo) estas plena je aliaj fermentitaj trinkaĵoj, kiuj dividas similajn produktoteknikojn al Musururu.

4. Mandale aŭ Mandrakwa (legu : mandrakŭa)

En la urbo Goma, ankaŭ en la tuta provinco Norda Kivuo, Musururu trovas ĉion en alia simila trinkaĵo, "mandale". Ĝi estas alia tre populara loka biero en la urbo Goma kaj aliaj regionoj de Norda Kivuo. Ĉi tiu



trinkaĵo, profunde enradikiĝinta en la kuirartan kulturon de Norda Kivuo, ĝojigas junulojn kaj maljunulojn, precipe virinojn. Mandale povas ankaŭ ebriigi se oni drinkas ĝin sen modereco. Ambaŭ Musururu kaj Mandale estas kvazaŭ manĝaĵoj, tial ili estas tre ŝatataj de laboristoj en Norda kaj Suda Kivuo.

4. Vinoj

En Norda Kivu estas produktataj diversaj vinoj kiuj ankaŭ ebriigas : *Nkolo Mboka*, *Bioforce*, *Balthazar*, *TikTok*, *Libala*, *Ngai Ngai*, *Kargasok*, ...

Disvastiĝo de Vinproduktejoj



Dum pluraj jaroj, la urbo Goma fariĝis centro por diversaj tre alkoholaj trinkaĵoj, kelkaj el najbaraj landoj, aliaj el la lando mem. Tiuj vinoj bedaŭrinde prezentas danĝeron por la loĝantaro, kiu konsumas ilin sen esti sufiĉe informita pri ilia konsisto. La produktantoj prezentas mensogajn detalojn pri la enhavo en reklamoj por vinoj produktitaj loke en Goma, Rutshuru, Bukavu, ... kaj aperigas ilin eĉ en la amaskomunikilo por altiri la atenton de la ĝenerala publiko. Ĉi tiuj loke produktitaj trinkaĵoj, vendataj je pli malaltaj prezoj ol aliaj, postulas kontrolon de siaj efikoj sur homojn, ĉar ili rapide malfortigas la korpojn de la konsumantoj. Junuloj tre ŝatas drinki vinojn !

FORTUNO

Honoré Sebuhero – Rutshuru

En la ĉiutaga franca lingvo, la vorto **fortuno** ĉefe difinas :

- *Grandan riĉecon, grandan posedaĵon.*


Ekz. Li faris fortunon en komerco ; tio signifas, ke li fariĝis tre riĉa.

- *La financon situacion de persono aŭ ĉiuj ĝiaj havaĵoj.*

Ekz. Li heredis konsiderindan fortunon.

- *Hazardon, bonŝancon aŭ destinon.*

Ekz. Fortuno ridetis al li. (Li estis bonŝanca)



Simpla difino: Fortuno estas la sumo de riĉeco posedata de persono aŭ depende de la kunteksto, bonŝanco kaj favoraj vivcirconstancoj. Mi demandis avon ; *kiel vi akiris vian riĉaĵon ?*

Li iomete ridetis, fiksas sian rigardon al mi, kaj diris : Mia filo, lernu ĉi tiujn regulojn :

Regulo numero 1 : Se vi naskiĝis malriĉa, ne estas via kulpo. Sed morti malriĉa estas via elekto.

Regulo numero 2 : Kritiko ofte venas el tiuj, kiuj neniam konstruis ion ajn.

Regulo numero 3 : Ĉesu postkuri ĉiun virinon. Elektu unu aŭ restu sola.

Regulo numero 4 : Vi ne malsukcesas, vi rezignas. Jes, se vi ne provas, vi certe malsukcesos, sed se vi provas, vi almenaŭ havas ŝancon sukcesi.

Regulo numero 5 : Homoj ofte malamas vin kiam ili ne plu povas kontroli vin.

Regulo numero 6 : Tenu viajn okulojn sur via sukceso. Lasu ilin ridi, kritiki, dubi kaj subpremi vin dum vi antaŭeniras.

Regulo numero 7 : Esti mallaborema estas perfidi tiujn, kiuj kredas je vi. Jes, perfidi viajn gepatrojn, viajn fratojn, viajn fratinojn, viajn infanojn kaj ĉiujn, kiuj esperas vidi sukcesi.

Regulo numero 8 : Ne elspezu vian monon por aspekti riĉa. Investu ĝin por riĉiĝi.

Regulo numero 9 : La tempo estas pli valora ol mono. Perdita mono povas reveni, perdita tempo neniam povas.

Regulo numero 10 : Ĉirkaŭigu vin per homoj, kiuj puŝas vin antaŭen, ne tiuj, kiuj trenas vin malsupren.

Regulo numero 11 : Neniam lasu eraron detrui revon konstruitan dum jaroj.

Regulo numero 12 : Laboru silente. Multaj homoj ŝatas paroli pri siaj planoj, sed malmultaj ŝatas labori por atingi ilin.

Kaj li aldonis : La vivo ne rekompencas senkulpigojn. Ĝi rekompencas penon, disciplinon kaj persistemon. Iam, la oferoj kiujn vi faras hodiaŭ, fariĝos la kialoj de via fiereco morgaŭ.

Neniam rezignu pri tio, kion vi vere volas konstrui. Zorgu pri vi mem !

Ni laboru senlace kun klara kaj preciza celo en la menso.



Honoré Sebuhero estas delonga instruisto de Esperanto, loĝanta en Rutshuru (Ruĉuruo). Li estas unu el la plej entuziasmaj e-kursgvidantoj en DR Kongo. Lia retadreso estas : honsebn@gmail.com.

KIU MI ESTAS?

Sharifa Abas – Kenjo

Strange kaj neofte oni povas demandi al si ĉi-tiun demandon kiam oni esprimas ion pri la okazaĵoj en sia vivo. Kiom da homoj demandus tiun demandon pri si mem? Mi mem ne imagis ke unu tagon mi povus havi revojn en mia vivo kaj kiel mi travivus ilin estonte. Tio certe timigis min en la pensado; KIU MI ESTAS ?

Mi rememoras de tempo al tempo, la kanton de unu el la plej konataj esperantistoj, el Danio, S-ro Kim Jesus, *"Mi estas sola"*, dum mia unua Esperanta aranĝo, la 31-an de majo 2012 en Nandi Hills, Kenjo. Ne estis facile por mi kompreni la senton el la kanto tiam sed dum la paso de la tempo mi sendube komprenas tiun kanton laŭvorte kiam li rekantas ĝin. La tempo, vojaĝo kaj veturilo tien kreis aventuran rememorindaĵon en mia koro. Finfine, ni atingis nian destinon sukcese.

La komprenado de la celo de la kanto *"Mi estas sola"*, dum jaroj elpensigas min pri alia demando; kiom da esperantistoj jam forlasis Esperanton? Ne, ofte oni devus pensi pri ili kaj la maniero en kiu ili forlasis la Esperantan mondon. Verdire, iam esperantistoj kabeas pro sento de soleco en siaj esperanto-agadoj, konfliktoj, nescio pri tio, kial ili esperantistiĝis, ktp. Tiuj faktoj, laŭ mia opinio, estas tio kio mortigas la disvastigon de Esperanto tra la mondo. Kiel gravas la unueco de Esperanto estonte?

El mia eta kono de Esperanto, la spertoj kaj aspektoj iel similas kvazaŭ mi travivas/os mian vivon nur en malsamaj manieroj, do eble mi estas homo kaj Esperanto estas ilo, uzinda en la ĉiutaga vivo tra mondo. Nun, mi provas krei vojon kiel travivi la estontecon! Ofte, mia nomo, Sharifa, "legu: *Ŝarifa*" kreus konfuzon inter homoj kiuj antaŭe ne sciis aŭ estas ilia unua fojo aŭdi mian nomon. La elvoko de emocio, menciado, sento, sekso, komprenado, difino de mia nomo k.t.p estas tre amuza ; verdire ne nur esperantuje sed ankaŭ ekster la Esperanta mondo. Tiel estas evidente al mi mem kaj ne surprizas min, delonge. Gravas al mi montri al la mondo ke mia komprenado de Esperanto varias de tempo al tempo...

- Mia sekso ne estas klara kiam oni vokas mian nomon.
- Ili difinus mian nomon.
- Ofte mi estas bonŝanca.
- Mia komprenado de Esperanto facilas sed mia parolkapablo ne bonas.
- Mia voĉo ĝenerale estas kritika... Kaj "KIU MI ESTAS ?".

Certe, mi nek scias nek konas la fierojn en mia vivo kaj nek komprenas kiel travivi estonte mian vivon. Kiel pri aliaj? Do, mi opiniis ke estus bona ideo demandi al esperantistoj kiuj jam konas min kaj tiuj kiuj ne konas min ; kiel ili renkontus min se ili eksciis ke mi devus travivi malsaman mondon kiel ili, eble tiel en filmoj, ekz *"Cinderellaj filmoj"*. Ĉu vi devus bonvenigi

min en vian mondon aŭ ne? Ĉio estas klara al mi nun sed ne aliaj, kaj eventuale eble ili povas akcepti la faktojn pri mia vivo!

Mia scio pri Esperanto estas ke multaj esperantistoj kiuj esperantiĝis kaj poste ne aktivis estas kvazaŭ jam forgesita en la movado. Por mi, tiu fakto mortigas la disvastigon de la Esperanta lingvo tra la mondo. Multaj esperantistoj jam forgesis mian nomon kiel same aliaj kiuj ne aktivis nun, kiom da aktivaj esperantistoj rememoras pri ili? Certe, neniu scias pri la kialoj de ilia malapero el aleoj kiam ili piediradis solaj. Ofte mi rememoras miajn geamikojn kvankam ili forgesis min tute. Mi ĵetas florojn al ili kiel donacon pro ilia fideleco kaj kontribuoj al la progreso de Esperanto. Same, kiel soldatoj en milito, ni devus konsideri iun ajn frukton de neaktivaj esperantistoj. Ili iam iel kontribuis al nia esperantomovado!

Mi invitas vin al mia venonta verko kaj eperas ke vi kunestos ĝis la fino de la aventuro.



Sharifa Abas sharifaabas8@gmail.com

Anonco pri korespondpeto :



Kwizera Barasebanya Héritier, estas 29-jaraĝa esperantisto el Rutshuru – Norda Kivuo (DR Kongo), deziras korespondi kun aliaj esperantistoj el la tuta mondo por povi plibonigi sian konon pri Esperanto. Li komencis lerni Esperanton en 2021 en Verda Stelano-Klubo (VSK).



S-ano Kwizera ŝatas diskuti pri diversaj aferoj, legi, kanti, danci, trumpeti.

Rete : kwizerabarasebanya@gmail.com,

Vacape : +243 992 237 371.



Kara leganto,

Ĉu vi estas kongolandano? Se jes, bone. Kunhelpu do florigi la e-movadon en DR Kongo partoprenante en poresperantaj klubaj aŭ asociaj agadoj, kaj ne forgesu raporti pri tio !

Viaj spertoj povas sendube avantaĝi al aliaj por pli energie aktivi en la movado.

Ni tre ŝatus ankaŭ legi de niaj eksterlandaj legantoj.

Redakcio.

Leciono pri la Sŭahila lingvo

SUBJEKTAJ PRONOMOJ – SEKVO

3. MEMSTARAJ PERSONAJ PRONOMOJ:

MIMI	= Mi, mi
WEWE	= vi, vi
YEYE	= li, ŝi, ĝi
SISI	= ni
NINYI	= vi
WAO	= ili

Ĉe ordinaraĵ verboj, memstaraj (aŭ aŭtonomaj) personaj pronomoj plifortigas la pronoman prefikson, neanstataŭigante ĝin. Do:

Yeye anakwenda Arusha	= Li iras al Arusha.
Mimi sisemi kiswahili	= Mi ne parolas la suahilan

Aliflanke, ĉe la verbo **KUWA** (= *esti*) en la prezenco, la persona pronomo estas esenca por marki la personon, la verbo estas identa (sama) por ĉiuj homoj:

Mimi <u>ni</u> mwalimu	= Mi estas instruisto
Wewe <u>ni</u> mfaransa	= Vi estas franco
Yeye <u>ni</u> mkenya	= Li/ŝi estas kenjan(in)o
Sisi <u>ni</u> wanfunzi	= Ni estas studentoj
Ninyi <u>ni</u> wageni	= Vi estas la gastoj
Wao <u>ni</u> watanzania	= Ili estas Tanzanianoj

Same en la negativa formo, anstataŭigu **NI** per **SI**.

EKZEMPLE :

Mimi si mjinga	= Mi ne estas stulta
Yeye si mkulima	= Li ne estas farmisto, terkultivisto

4. SPECIALA PRONOMO: “-OTE”:

-OTE kiu signifas: “*ĉio, ĉiuj*” povas esti uzata kiel memstara pronomo, aŭ povas akompani substantivon.

En ĉiuj kazoj, ĝi konsentas en klaso kun la substantivo al kiu ĝi rilatas. Laŭ sia signifo, ĝi estas uzata pli ofte en la pluralo ol en la singularo.

KLASOJ	SINGULARO	PLURALO
M-/WA- (Kl 1 / 2)		WOTE
M-/MI- (Kl 3 / 4)	WOTE	YOTE
JI-/MA- (Kl 5 / 6)	LOTE	YOTE
KI-/VI- (Kl 7 / 8)	CHOTE	VYOTE
N- (Kl 9 / 10)	YOTE	ZOTE
U- (Kl 11/14/10)	WOTE	ZOTE

EKZEMPLOJ:

Mwili wote waniuma	Mia tuta korpo doloras
Lete visu vyote	Alportu ĉiujn tranĉilojn
Chakula chote kimeharibika	La tuta manĝaĵo estas difektita
Watu wote wamefika	Ĉiuj (homoj) alvenis

Ni ankaŭ povas asocii **-OTE** kun memstaraj pronomoj aŭ nombroj.

EKZEMPLE :

Sisi sote	Ni ĉiuj
Ninyi nyote	Vi ĉiuj
Sote wawili	Ni du (ni ambaŭ)
Nyote wawili	Vi du (vi ambaŭ)
(Vitabu) vyote viwili	Ambaŭ (libroj)
(Miti) yote mitatu	Ĉiuj tri (arboj)

VORTOLISTO

Mfanyakazi (wa-)	laboristo(j)
Msafiri (wa-)	vojaĝanto(j)
Mgiriki (wa-)	greko(j)
Mtanzania (wa-)	tanzano(j)
Mjinga (wa-)	idiotoj(j)
Mwashi (wa-)	masonisto(j)
Mkenya (wa-)	keniano(j)
Mwongo (wa-)	mensoganto(j)
Mlevi (wa-)	ebriulo(j)
Mzanzibari (wa-)	zanzibaro(j)
Mmasai (wa-)	masajo(j)
Mzazi (wa-)	parenco(j)



Kvieta pasio (1973)

Poemo verkita de NOBUKUNI Hiroshi kaj KONISI Gaku, kantita de TANAKA Akiko.
Tiun poemkanton vi povas ĝui en jutubo kaj tubaro.aperu.net.

Brilas steloj helaj en la firmamento
kaj kampofajro brulas kun favor'.
Samideanoj, kantu en kresĉendo
eĉ se ankoraŭ ne tre laŭtas sonor'.

Kredas homoj; iam venos estonteco
por ke komprenu ĉiuj inter si.
Sed vanas revo, venos la sukceso
nur per penado kaj obstina pasi'.

Eĉ se multaj mortos, estos dispremitaj,
postsekvos ilin plua milion'.
Transvivos forte semoj dissemataj
kaj iam kreskos nova fresa burĝon'.

Tenu ni la torĉon en la mano alte.
Nin ne timigos baroj nek danĝer'.
Ni plu marŝados daŭre kaj senhalte,
kaj ĉiam gardas nin la stel' de mister'.

Paco kaj libero, vivo en progreso
al ĉiuj homoj sur la tuta ter'.

La mondon regos amo kaj frateco,
jen nia revo, nia granda esper'.

La red.

